## 82-A SAT KONGRESO - 18-25 Julio 2009
### Milano - Italio

Por pliaj informoj, kiam haveblaj, kontaktu **la peranton** (vidu paĝon 10) aŭ vizitu **<http://www.sat-esperanto.org>.**

**Koresponda adreso:** Ĉefa kontakt-adreso: Andrea Montagner, @: andrea.montagner@arciesperanto.it

**OKK:** Andrea Montagner - Prezidanto: <andrea.montagner@arciesperanto.it>; Carlo Bourlot - Konsilisto: <c.bourlot@libero.it>; Nicola Ruggiero - Retpaĝo kaj rezervigoj <nicolaruggiero86@gmail.com>; Andrea Fontana - Kultura programo <fontanaandrea@fastwebnet.it>; Camilla Masciadri - Vizoj

| **Kongreskotizoj (€)** | Ĝis 28.02.09 | Ĝis 30.04.09 | Ĝis 30.06.09 | Poste |
|---|---|---|---|---|
| SAT-membro | 50 | 55 | 60 | 65 |
| SAT-geedzoj(se ambaŭ) | 75 | 85 | 90 | 95 |
| SAT-junuloj ĝis 25 j. | 25 | 30 | 35 | 40 |
| Nemembro | 60 | 65 | 70 | 75 |
| Junula nemembro | 30 | 35 | 40 | 45 |

- Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas kotizon

* La partoprenantoj el CZ, EE, HU, LT, LV, PL, SL kaj SK ĝuas 30% rabaton.

* La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU ( krom SL) kaj eksa SU (krom EE, LT, kaj LV) kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50% rabaton.

* Kongresaneco ne transdoneblas al alia persono. La kotizo ne inkluzivas manĝadon kaj loĝadon, ekskursojn kaj aliajn aparte pagendajn aferojn, ankaŭ nenian asekuron.

* La kotizo ne estas repagebla senkonsidere pro kia kaŭzo la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson.

* Aliĝilon sen pago de kotizo kaj prezo de unu tranokto OKK ne traktos

**Atentu: Personoj el la landoj, kiuj bezonas enirvizon por Italio, devas indiki tion antaŭ la 30-a de aprilo 2009. Pli poste ne plu eblos trakti tion. Ni petas ke vizpetantoj nepre aldonu necesajn datumojn en la aliĝilo.**

Kongresejo "Zumbini Rooms" Via Zumbini 6, 20143 Milan, Italio

Loĝejoj - Ĉambroj (Eŭroj po nokto po ĉambro se ne indikita aliel):

Zumbini Rooms: unulita 50, dulita 90, trilita 110 kvarlita 140.

Gastejo Burigozzo: Komunaj - 6-16 lokoj po ĉambro - 21 po nokto po persono

Privataj: unulita 50, dulita 70, geedza 80, trilita 90 kvarlita 110.

### *82nd SAT Congress 18-25 July 2009 in Milan (Italy)*

*These congresses are one of SAT's main activities, combining AGM activites with plenty of opportunities to hear about and discuss progressive issues and with some tourism as well. The participants will come from many different parts of the world, so the programme will be in Esperanto only, the working language of SAT. Also the volunteer organisers can only deal with their local language and Esperanto. For practical reasons, a sufficient knowledge of Esperanto is required by all those not accompanied by an Esperantist.*



**Gazeto de Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio**

# La Verda Proleto

**Journal of Workers' Esperanto Movement (SATEB)**

Numero 431 ~~~ Aprilo 2009

## Ĉu sennaciismo = homaranismo ?

Dum lastaj semajnoj mi iom pensis pri 'ideologio de Esperanto', ĉar mi prilaboras prelegon pri tiu temo. Ege interesa tereno …

Ĉiuj scias, ke Lejzer Zamenhof havis tre klaran ideologion de Esperanto: ĝi nomiĝis la 'interna ideo'. Fakte, tio estis nur kaŝnomo por lia plena ideologio - homaranismo. Komence, tiu 'ismo' nomiĝis 'hilelismo' (pro hebrea rabeno) kaj estis por hebreoj: speco de 'religia ponto' inter judismo kaj la cetera homaro. Poste, Zamenhof konstatis, ke tiuj ideoj same validas por ĉiuj homoj; li ŝanĝis la nomon al 'homaranismo'. Li volis publikigi siajn ideojn dum Esperanto-kongresoj, ek de 1905, sed konstante kontraŭis lin la franca 'gravularo' de la movado, bando de armeistoj, profesoroj, advokatoj, kuracistoj - senescepte burĝoj. Zamenhof, komplezema, timema homo, akceptis ilian konsilon kaj diluis siajn ideojn al la interna ideo, plej klare esprimita en la himno, 'La Espero'. Fine, li eldonis siajn ideojn, broŝurforme, en 1913.

Por Zamenhof, la ĉefaj dividoj inter la homoj estis laŭ gento: hebreo, ruso, polo, germano, ktp. Tio spegulas lian propran sperton kiel ano de la hebrea malplimulto - persekutata, cetere - en multgenta rusa regno. Li malpli konsciis pri klasdividoj, kvankam pograde li ekkonstatis dum lastaj jaroj de la vivo, kaj kondamnis klasdividojn, same ol gentajn, lingvajn kaj religiajn. Baze, Zamenhof kredis je la unueco de la homaro, parolante ĉiam pri frateco, justeco, homaraneco. Fine, depost 1911, li kondamnis ankaŭ la naciismon, inkluzive la hebrean.

(Daŭrigo p 9)

### *Sennaciismo = Homaranismo ??*

*- an English translation appears on page 8*

# * S.A.T.E.B *

## WORKERS'ESPERANTO MOVEMENT


Prezidanto / *Chairperson* Mrs. Pearl Simons, 'The Cottage' 34 Beaulieu Drive, PINNER, Middx HA5 1NG Tel: 020 8429 3531

Sekretario / *Secretary*: David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT Tel: 01555 759166 <davidekelso@yahoo.co.uk>

Kasisto / *Treasurer* Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, BRENTWOOD, Essex CM13 1EJ Tel: 01277 228962 <arturo@signalprent.demon.co.uk>

**La Verda Proleto** Redaktoro / *Editor* Vakas. Ĝis nova redaktoro elektiĝas, bonvolu sendi ĉiujn kontribuaĵojn al la sekretario (vidu supre). *Vacant - Until a new editor is elected, please send all contributions to the secretary (see above)*


**Pri la enhavo de kontribuaĵoj respondecas nur la aŭtoroj mem.**
***Views expressed by contributors are the responsibility of the authors alone***

### REDAKTORO / *EDITOR*

Ankoraŭ mankas al ni redaktoro. La komitato serioze esploros ajnan proponon por tiu posteno - dankon.
*We are still without an editor. The committee will seriously consider any suggestions for this post - thank-you.*

### KOTIZOJ / *SUBSCRIPTIONS*

**La SATEB-kotizo por 2009 estis pagenda en januaro.**
**Se vi ankoraŭ ne pagis, bonvolu tuj pagi.**
***The SATEB subscription for 2009 was due in January.***
***If you haven't yet paid please do so now***
Detaloj kaj formularo je paĝo 13 / *Details and form on page 13*

**La SAT-kotizo por 2009 pagendos en januaro (vidu paĝon 14).**

### SATEB - Jarkunveno 2009 / *SATEB - AGM 2009*

**Por kuraĝigi partoprenon, la komitato pagos al la unuaj ses membroj, kiuj tion petas, duonon de la vojaĝkostoj (maksimume £50).**
***To encourage attendance, the committee will pay, to the first six members who ask for it, half their travel costs (maximum £50).***

**DANKON -** Ni daŭre dankas al Paul Gubbins pro lia zorga kontrolado de LVP.
**THANK-YOU** - We are always thankful to Paul Gubbins for his conscientious checking of LVP

**LVP 432** Kontribuaĵoj invitataj - limdato 30-an de junio 2009
*Contributions are invited - to reach us by 30th June 2009*





### Milano Renesanca

### Milano Renesanca

Kastelo (+ eventuale Kolektoj pri Skulptarto, Ĉambrego de la Plafontabuloj de Leonardo kaj Kompato "Rondanini" de Mikelanĝelo) - S. Maria de la Gracoj - S. Maria ĉe S. Satiro (perspektivo de la absido - sakristio) – Eksa Granda Malsanulejo (fasado de Filarete; de lundo ĝis ĵaŭdo oni povas viziti ankaŭ la internon - nuntempe universitaton - kun korto, klaŭstroj kaj navokruciĝejo)

### Boromeaj Vilaoj kaj Insuloj (Lago Majora)

Koncernos la plej konatajn kaj karakterizajn el la Boromeaj Insuloj.
La ĉefinsulo - kun ĝiaj anglastilaj botanikaj ĝardenoj riĉaj je variaĵoj de plantoj devenantaj de ĉiu mondoparto, la palaco tute meblita kaj la apuda familia kapelo.
La plej pentrindan angulon de Golfo Borromeo - la Insulo de la Fiŝistoj - malnova vilaĝo ankoraŭ nun loĝata, kun ĝiaj simplaj domoj, ĝia mallarĝaj stratoj kaj ĝia malgranda preĝejo de Sankta Vittore.
La Bela Insulo, la plej famkonata, pro ĝia luksa baroka palaco kun la ĉambregoj riĉaj je historio kaj la tipaj grotoj. La italstilaj artaj ĝardenoj per siaj dek terasoj proponas al la vizitantoj ne nur arkitekturajn alrigardojn laŭ senkompara beleco, sed ankaŭ rimarkindajn floradojn dum printempo kaj somero.

### BERNINA EKSPRESO - La eta trajno de la glaciejoj (Svislando)

La Svisaj Fervojoj havas multajn meritojn, inter kiuj tiun, ke ili konstruis fervojajn liniojn, kiuj laŭiras la kurboplenajn itinerojn de Alpoj.

### La eta trajno de la Cent Valoj - (de Domodossola ĝis Lokarno)

La eta trajno de la Cent Valoj, ankaŭ nomata "Blua eta trajno de Valo Vigezzo", trairas Valon Vigezzo en itala teritorio kaj ĝian plilongiĝon en svisa teritorio, ĝuste la Cent Valojn. La eta trajno suprengrimpas montarojn kun spirhaltigaj deklivoj, tra viaduktoj, pontoj, tuneloj, kaj multaj aliaj inĝenierartaj verkoj jam malfacile koncepteblaj nuntempe, kaj do eksterordinare modernaj, kiam ili estis efektive realigitaj, nome ĉirkaŭ la sesdekaj jaroj de pasinta jarcento.

### Milano Rom-epoka

Arkeologia Muzeo (Korso Magenta) – Turo de la muregoj de Maksimiano + Turo de la Cirko (enprenita en la sonorilturon de la Granda Monaĥinejo) – restaĵoj de strato Brisa (iam opiniitaj Varmbanejoj, pli probable temas pri ejoj de la Imperiestra Palaco) – [Laŭpete: restaĵoj de la Teatro (apud la palaco de la Borso, kun senpaga eniro marde kaj ĵaŭde post antaŭmendo ĉe la Komerca Ĉambro] - restaĵoj de la Cirko (samnoma strato kaj strato Cappuccio) - Pordo Tiĉina kaj Pordo Romana (el la rom-respublika epoko) – Kolonoj de S. Laŭrenco – preĝejo S. Laŭrenco + Kapelo de S. Akvileno (Aquilino) (mozaikoj) – Parko de la Amfiteatro (de mardo ĝis sabato matene) + Antikvaĵejo "Alda Levi" (kun la steleo de Urbicus; de ĵaŭdo ĝis sabato matene).

### *82nd SAT Congress 18-25 July 2009 in Milan (Italy)*

*Please see footnote on page 16.*

# Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT

Tutmonda forumoj, rektaj kontaktoj - per tiuj SAT celas antaŭenigi informadon kaj interkomprenon inter laboristoj kaj progresemuloj, por helpi forigi maljustecon ktp.

SAT uzas la racie elpensitan lingvon **- Esperanto -** por atingi siajn celojn.

*Worldwide forums, direct contacts - by these S.A.T. aims to promote knowledge and understanding amongst workers and progressives to help overcome injustice etc. - using the rational language **Esperanto** to achieve its aims.*

La demokrata strukturo de SAT estas inter-membra, ne inter-"nacia".

*SAT's democratic structure is based on members, not on national boundaries. Note that the worldwide nature of SAT means that only Esperantists may join.*

SAT kongresas ĉiujare en diversaj mondo-partoj, "Sennaciulo" aperas preskaŭ ĉiumonate, "Sennacieca Revuo" (literatura revuo) aperas jare. Adresaro (regule ĝisdatigita) ebligas rektajn kontaktojn inter la anoj. SAT eldonas librojn kaj broŝurojn kongrue al la celoj, kaj laŭnecese vortarojn, aliajn librojn, ktp.

**Membro-kotizo: £35**. Membroj ricevas "Sennaciulo"-n, "Sennacieca Revuo"-n, kaj adresaron, kaj rajtas pagi rabatan kongres-kotizojn.
(Minimume £18 por tiuj kiuj vere ne kapablas pagi la plenan kotizon)
**Dumviva membreco** nun havebla - **£875** - rabato ne haveblas.
Nemembroj rajtas aboni al "Sennaciulo" kun "Sennacieca Revuo" kontraŭ £40. Sendu monon (se en britaj pundoj) al la peranto, ne al SAT.

Oficejo: SAT, 67 Ave Gambetta, F-75020 Paris, France. Retadreso: <satesperanto@free.fr> TTTpaĝo:<http://www.sat-esperanto.org>

**Uzu la suban formularon por informpetoj kaj pagoj por Britio**, kaj sendu al la peranto: Arturo Prent, 7 Walton Gdns, Hutton, Brentwood, Essex, CM13 1EJ
(Ĉekoj pagendaj al "SAT") Retadreso: arturo@signalprent.demon.co.uk

*tranĉu* >- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

***Sendu al la peranto (vidu supre)***

☐ Bonvolu sendi pli da informo pri SAT ☐ Bonvolu sendi aliĝdeklaron ☐ Bonvolu sendi informon kaj aliĝilon por la SAT-Kongreso

☐ Realiĝo / abono Dato ________________________

Nomo ________________________________________________

Adreso ________________________________________________

________________________________________________

(nedevigaj)-> tel: ________________________________________

retadreso: ________________________________________

☐ Marku, se ni rajtas sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

Mi kunsendas:- kotizon £_______+ donacon*£________sume:- £_________

per ĉeko/poŝtmandato/______________ (ĉekoj al "SAT.")

*celo por donaco_________________________________



## SATEB-jarkunsido 2009 / *AGM 2009*

**La jarkunsido de SATEB okazos je 14.00, la 24-a de oktobro, ĉe:**

***The SATEB AGM will be held at 2.00 pm on the 24th of October at:***

**Wedgwood Memorial College, Station Road, Barlaston,**
**Stoke-on-Trent ST12 9DG**

### Tagordo / *Agenda*

1. **Enkonduko (*Introduction*)**
2. **Pardonpetoj (*Apologies*)**
3. **Protokolo de la pasintjara jarkunsido (*Minutes of the last AGM*)**
4. **Raporto de la komitato (*Committee report*)**
5. **Kasraporto (*Treasurer's report*)**
6. **Membraro (*Membership*)**
7. **Publico (*Publicity*)**
8. **SAT**
9. **Estonteco de SATEB (*Future of SATEB*)**
10. **Balotoj (*Elections*)**
11. **Aliaj aferoj (*Any other business*)**

La kunveno okazos en Esperanto

*The meeting will be conducted in Esperanto*.

Por ke vi havu pli profitdonan semajnfinon, la kunveno okazos kadre de Drondo 4 (Diskut-rondo), organizota de Derek Tatton.

**Vi rajtas veni sole por la kunveno,** sed se vi volas refreŝaĵojn, aŭ tranokton, tion vi devos aranĝi kun la kolegio (adreso supre).

Se aliĝilo por Drondo 4 ne troviĝas kun LVP, bonvolu peti de la kolegio (adreso supre).

Se pro manko de spaco en la kolegio necesos loĝi ekstere je pli alta kosto por simila komforto, SATEB pretas pagi la diferencon.

*To allow you to have a more productive weekend, the meeting will form part of ODD4 (Odd Democracy Discussion Circle), organised by Derek Tatton.*

***You may come to the meeting only**, but if you wish to have refreshments, or stay overnight, you must arrange this with the college (address above).*

*If the leaflet with application form for ODD4 is not with LVP, please contact the college (address above).*

*If through lack of space in the college you have to stay outside at a higher cost for similar facilities, SATEB is prepared to pay the difference.*

## La Nuntempa Financa Krizo

En februaro 2009, kiam la artikolo estis kreata, ni staris en la mezo de krizo de la financa sistemo. La krizo trapenetras la mondan kapitalisman sistemon. Kiam HSBC nomas sin 'la loka banko', kaj Citibank diras, ke ĝi neniam dormas, - tio ne estas nur sloganoj. Tio signifas, ke la bankoj havas branĉojn ĉie en la mondo. La novlaborista registaro vekiĝis al la fakto, ke kapitalismo estas la monda sistemo herede nestabila, nur somere 2007, kiam fariĝis evidenta kolapso de Northern Rock. La registaro de Brown kaj la Centra Banko de Anglio reagis per la eksterordinaraj rimedoj por restabiligi la sistemon. Kiel ni devas kompreni la respondon de registaro kaj la komunikiloj al la financa krizo?

La novlaborista registaro estis tute surprizita. Dum la pasintaj dek jaroj Brown deklaradis, kvazaŭ ripetante mantron: 'Ne plu.kresko kaj kraŝo' La registaro glutis sian propran propagandon. Ĝi estas hipnotigita de vortoj kaj sloganoj de bankistoj and kapitalistoj: 'liberaj merkatoj kaj liberigo'. Kaj la figfolia reguleco, kiun FSA (Aŭtoritato de Financaj Servoj) provizas, estus sendenta kaj pretus servi la interesojn de la industrio anstataŭ regi ĝin. Sekve, Brown predikis liberigon al la Eŭropa Unio: 'Eŭropo devas kopii la britan vojon al kapitalismo!'. Tamen, planoj de Blair kaj Brown estis la ponardoj celantaj la koron de ideo 'Socia Eŭropo' proponita de Jacques Delors. Estas Delors, kiu en la 1980-aj jaroj avertis bankistojn and kapitalistojn, ke modelo de Eŭropo nur kiel merkato malsukcesigus homojn. Ĉu Brown denove naskiĝis kiel socialisto? Ho ve, lia strategio estas la jena: uzimonon de impostpagantoj, subvencii la bankojn kaj poste, kiam ili fariĝas profitaj, revengii ilin al la privata sektoro. La frazo 'ŝtatigi la perdojn kaj privatigi la gajnojn' resumas la ekonomian politikon de la Novaj Laboristoj. La partio estas edziĝinta al korporacia kapitalismo kaj la banka sistemo. Ĝia strategio estas la reformo de la sistemo, sen la radikala ŝanĝo por interesoj de la homoj. Intertempe, la elcento de senlaboreco altiĝas kaj, same kiel en la 1930-aj jaroj, la problemo estas traktita kiel neevitebla. La senlaboruloj estas reproĉitaj kaj viktimigitaj pro sia situacio. Multaj miloj da ili perdas siajn domojn kaj ŝparaĵojn. La malriĉuloj en Usono (tielnomita 'ne altkvalita merkato') estas reproĉitaj pro la krizo.

'Kiel tio povis okazi?' krias la registaro kaj la komunikiloj. Ilia klarigo similas al horoskopoj de astrologoj aŭ veterprognozoj de meteorologoj. Nun profesoroj – pri ekonomiko el universitatoj estas pli ol konfuzitaj. La gazetredaktoroj histerias. Modernaj ekonomikaj teorioj prezentas, uzante abstraktajn modelojn, funkcion de kapitalista sistemo. Inokulitaj kontraŭ historio, la ekonomikistoj eltrovis globaligon. En la keloj de librejoj estas denove eltrovitaj kaj senpolvigitaj la libroj de Lordo Keynes

(Daŭrigo p 6)



# SATEB

## *WORKERS' ESPERANTO MOVEMENT*

Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio celas "diskonigi kaj instrui la internacian lingvon Esperanto kaj antaŭenigi la ideojn de S.A.T."
- celas venigi Esperanton al ĉiuj progresemaj organizoj.

*SATEB - aims "to make known and teach the international language Esperanto, and promote the ideas of SAT."*
*- aims to bring Esperanto to the notice of all progressive organisations.*

Por informo pri SAT bonvolu vidi la venontan paĝon.
*For information about S.A.T. please see the next page.*

SATEB estas sendependa de SAT, sed aktive subtenas ĝin per disvastigo de informoj pri ĝiaj principoj kaj laboro, kaj per organizado de kunvenoj ĉiujaraj.
SATEB *is independent of S.A.T., but actively supports it by spreading information about its principles and work, and by organising yearly meetings.*

**Por pli da informo** bonvolu sendi la suban formularon al la sekretario:
***For further information*** *please send the form below to the secretary:*
David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT
aŭ **retu** al / *or* ***email*** *to*: <arturo@signalprent.demon.co.uk>

Membrokotizo, inkluzive / *Membership, including* : 'La Verda Proleto': £7.00
(tiuj kun malaltaj enspezoj -minimume / *those with low incomes -min.* : £3.00)
(Abono nur por / *Subscription only for* : 'La Verda Proleto': £5.00)

Realiĝoj:- sendu formularon kaj pagon al la kasisto (adreso p. 3)
*Renewals:- send form and payment to treasurer (address on p. 3)*

*cut* > - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - < *tranĉu*

☐ *Information request* Informpeto ☐ *Please send membership form* Bonvolu sendi aliĝilon ☐ *Renewal* Realiĝo

*Name* / Nomo ______________________________

*Address* ______________________________

/ Adreso ______________________________

(*optional* / } *Phone* / Telefono ______________________________

nedeviga )} *email* / retpoŝto ______________________________

*You may send my details to other Esperanto organisations* ☐
Vi rajtas sendi miajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

*I enclose / :* } *membership /* kotizon £_________ *donation* £_________
Mi kunsendas } *subscription* / abonon / donacon

*Date* / dato______________________ *Total /* Sumo: £__________

*cheque/PO/other* ______________ ĉeko/poŝtmandato/alia______________
*cheques etc. payable to / ĉekoj ktp. pagendaj al "SATEB"*

Plue, tiel-nomataj teroristoj - aù hamasaj herooj - kiuj senrespondece kaŝiĝas meze de (certe samgentaj, certe samreligiaj ktp) civiluloj estas tutsimple fiaĉuloj, kiuj ne meritas la titolon de "soldatoj de dio"!

En tiu-ĉi masakro, buĉado sennoma, je la nomo de civilizacio, en teritoriomalgranda, dum daùro ege longa, estas krimo, kaj ni algapas tion kaj ŝultrumas, ja oscedas.

Neniu el la viktimoj ricevos nian benon: ni ja estas SATanoj.

Klod

................ (la diskuto daŭras) ..................

**En Seulo, 6 homoj mortis pro polica subprem-operaco**

Karaj,

mi sendas tro tragedian novaĵon el Koreio. Nuna korea registaro ĉiam pli kontraŭas al popoloj bedaŭrinde. Bonvole legu kaj disvastigu mizeran situacion.

[Tragedio] En Seulo, 6 homoj mortis pro polica subpremado Urba rekonstruada politiko forpelis loĝantojn kaj finfine murdis homojn.

Tragedia afero okazis en rekonstruada loko en distrikto Yongsan en Seulo, frumatene en la 20a de januaro, 2009. 6 homoj mortis kaj pli ol 20 homoj vundiĝis dum polica subpremado. 5 mortintoj estas forpelitoj de sia propra loĝejo kaj vendejo pro la urba rekonstruada politiko. Kaj alia 1 mortinto estas policano de polica ŝtorm-taĉmento. Ĉi tiu akcidento okazis post 1 tago de sinenfermado de forpelitaj loĝantoj.

La ĉefo de Seula Polic-administrejo, Kim Seokgi, agnoskis enĵeti polican taĉmenton(kutime ili estas specialaj policoj kontraŭ teroro). Kaj forpelitaj loĝantoj kontraŭbatalis per flambotelo. Jam policanoj sciis la danĝeron de brulego, tamen ili devige plenumadis la subpremadon. Dum la subpremado okazis granda brulego kaj la viktimoj estis brulmortigitaj.

La forpelitaj loĝantoj el siaj loĝejoj kaj vendejoj postulis sufiĉan kompenson por translokiĝi. Sed administracio de urbo Seulo, konstrua entrepreno, rekonstruada sindikato rifuzis doni sufiĉan kompenson al loĝantoj. Tial la loĝantoj komencis sidostrikon kontraŭ perforta forpelado.

Ĉi- akcidento koncernas ne nur ilin, similaj rekonstruadoj kaj forpeladoj al loĝantaro en tuta Seulo okazas sub rekonstruada politiko tiel nomata de "Plano de Nova Urbo" (New Town Plan) post elektiĝo de prezidento Lee Myeongbak.

................. (daŭras) ..................amike Paz

................ (la diskuto daŭras) ..................

~~~~~

Ĉi tiuj ĉerpaĵoj estas ekzemploj de la enhavo de la SAT-diskuto (kun gramatikaj korektoj). Anoj de SAT povas vidi la tutan gamon. Por aliĝi al SAT, vidu p. 14.

*A sample from the SAT email discussion group: - about the war in Gaza, and the deaths of 6 people during police action in Seoul. The group is open to SAT members, and is in Esperanto - the language of SAT*



## ***The Contemporary Financial Crisis***

At the time of writing, February 2009, we are amidst a crisis of the financial system. The crisis permeates the capitalist system globally. When HSBC say it is 'a local bank', and Citibank says it 'never sleeps', it isn't just a slogan. Like a host of other banks, it means they operate across the world. The New Labour government awoke to the fact that capitalism is a global system that is inherently unstable only after Northern Rock was discovered to be insolvent in the summer of 2007, precipitating the emergency measures of the Bank of England and the Brown government to restabilise the system. What are we to make of the government and the media's response to the financial crisis?

The New Labour government was taken completely by surprise. For years' Brown has repeated 'No more boom and bust' like the mantra of a meditation master. The government has swallowed its own propaganda. It was hypnotised by the words and the slogans of the bankers and capitalists: free markets and liberalisation. And the fig leaf of regulation provided by the Financial Services Authority (FSA) would be toothless and framed to serve the interests of the industry they were supposed to police. Yet Brown preached liberalisation to the EU. Europe should copy the British road to capitalism! But Blair/Brown's policies struck like a dagger at the heart of Jacques Delors' notion of a 'Social Europe'. It was Delors who warned the bankers and capitalists in the 1980s that the model of Europe as just a market place would fail the people. So is Brown a born again socialist? Alas, Brown's strategy is to use tax payers' money to subsidise the banks and restore stability and ownership to the private sector. The big salaries and the big bonuses continue. The phrase 'nationalise the losses and privatise the gains' summarises the New Labour economic policy. New Labour is married to corporate capitalism and the banking system. Its strategy is to reform the system, not radically change it in the interests of the people. Meanwhile unemployment continues to rise and, like in the 1930s, the problem is treated as inevitable. The unemployed are blamed and stigmatised. Many thousands are losing their homes and their savings. The poor in America ('sub-prime market') are blamed for the crisis.

'How could it happen?' cry the government and the media. The explanations, from the government, the media, the BBC, read like astrology and the weather forecasts from the Meteorology Office. The economics professors are baffled. The editorial writers of the newspapers are hysterical. Modern economics just describes, on the basis of abstract models, which, in turn assume, the workings of the capitalist system. Inoculated against history, the economists have discovered 'globalisation'. Lord Keynes' books are re-discovered in the basements of the libraries and dusted down.

(Cont'd p 7)
~~~~~

La Nuntempa Financa Krizo (Daŭrigo de p 4)

Tamen, post kiam Karl Marx publikigis sian 'Kritikon pri politika ekonomio' antaŭ pli ol jarcento, la socialistoj sciis, ke kapitalismo pligrandiĝas tutmonde kaj la kapitalista sistemo estas homkreita, ĝi ne estas produkto de la naturo aŭ funkcio de la steloj. Ke krizoj de troproduktado kaj la konkurado kaŭzas fojajn 'rapidajnkreskojn' kaj 'kraŝojn', 'kiuj gvidas la financan sistemon al la krizo. Historio montris la forton de la marks-a analizo. Malsekureco, senlaboreco, senĥejmeco, malriĉeco, ktp, de milionoj da homoj revenis al Eŭropo kaj Nord-Ameriko. (La 'ne altkvalita merkato' ne ekzistus, se la malriĉuloj ricevus verajn laborlokojn – bezonatajn por justa distribuo de riĉeco.) Kaj ankaŭ la miopeco de kapitalista ideologio ne estas nova.

La belga socialisto Ernest Mandel jam verkis'Lastatempan kapitalismon' (1975) kaj prognozis 'La mondan monan krizon' (Internacia Revuo, Nov/Dec 1982). Li diskutis, ke la socio estas organizita por servi interesojn de korporacia kapitalismo kaj la banka sistemo. Kaze de troproduktado, komerco kaj la registaro kuraĝigas proponon de kreditoj al pli kaj pli da homoj [malgraŭ lasekvoj]. La socialista propono estas la jena: reorganizi la ekonomion kaj la bankojn por servi la homojn. Jam ne plu defendeblas akcepti Eŭropon kiel la merkatan lokon por cirkulado de varoj kaj traktado de homoj kiel aĵoj por uzi kaj ignori ilin. Ke la riĉuloj bezonas grandajn salajrojn por instigi ilian laboron, dum la malriĉuloj kaj senlaboruloj devas konkuri por malpli da salajro aŭ estas kondamnitaj viciĝi por la senlaboreca subvencio.

Kapitalismo malsukcesis. Ĝi ne povas garantii stabilecon, sekurecon kaj socian justecon. Ni bezonas 'Socian Eŭropon', ne nur lokon por merkato. La solvo troviĝas en socia solidareco, intelektula forteco kaj morala vizio de socialismo, kiu sola povas oferti socion bazitan sur demokratio, paco kaj socia justeco.

Guy N.

~~~~~

## Vortoj de Zamenhof pri laboristoj

'Eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo.'

Rusio: - Sindikatoj petas salajrpliigon

Ĉe kunveno inter ĉefministro Vladimir Putin kaj sindikatestroj, Putin diris, ke labororganizoj povus plibonigi la labormerkaton. Ili diskutis la kontraŭkrizajn rimedojn jam aprobitajn de la registaro. Laboristoj iome malkontentas pri prezoj, kiuj kreskas. Sindikatoj kredas, ke pli grandaj salajroj povus stimuli aĉetadon. Ili opinias, ke la minimuma salajro bezonas 25% pliigon. Jam en januaro la minimuma salajro duobliĝis ĝis 4330 rubloj monate, kaj tio uziĝas kiel bazo por nespertaj laboristoj kaj kelkaj, kiuj ricevas salajron de la registaro. Sed ekonomikisto Sergei Roshchin opinias, ke salajrpliigon per registara regulado malplibonigus la labormerkaton.

Sindikato ĉe la Coca-Cola fabriko en la Sverdlovsk-regiono jam plendis pri tranĉo de krompago por noktolaboro. Coca-Cola rifuzis komenti.

Putin alvokis sindikatojn informi laboristojn pri registaraj planoj. La registaro intencas krei milionon da portempaj oficoj kaj reeduki 220 000 laboristojn, aŭ helpi ilin starigi komercaĵojn. Putin ankaŭ urĝis sindikatojn reagi al rompado de laborleĝoj, kaj ruzoj, per kiuj laboristoj kaj dungantoj evitas impostojn. Sindikatoj devas labori por plibonigi efikecon, kaj helpi laboristojn, kiuj maldungiĝas. Putin diris, "Prizorgi homojn repagos centoble."

Je la mezo de marto, senlaboreco estis 2.6% (2 milionoj) kaj pluaj 560 000 baldaŭ maldungiĝos.

*(Labourstart is a web site for trade union news. It has reports in Esperanto as well as many other languages.)*

~~~~~

## Ĉerpaĵoj el la per-reta SAT-diskuto: -

**Ĉesis la milito en Gaza**

1300 palestinaj mortintoj, 13 israelaj mortintoj, gazaa teritorio parte detruiita

Ni gajnis, diras Hamas- gvidantoj

Ni gajnis diras israelaj gvidantoj

Simpla konkluda kalkulo :1 israelano valoras 100 palestinananojn

Ĉu tiu kontentiĝo eblas?

M.Noulin

Gekaraj SATuloj!

Mark komparis unu viktimon de la israela armeo kun centoj da civilaj (hamasaj) viktimoj en la Gaza-teritorieto. Unue mi respondus, ke neniu soldato de iu-ajn armeo estas por mi viktimo tolerebla. Same neniu civila viktimo estas kalkulebla, kiel nombro, unu mortinto estas nenombrebla krimo.

Ĉiu stultulo, kiu akceptas porti uniformojn, kontraùpafan vestaĉon, pafilegon, kiu ŝprucas dek kuglojn sekunde ne estas nur viktimo. Kaj mi bedaùras tion tre kompari tiun viktimon, kiu portas David-stelon kun aliaj iamaj viktimoj, al kiuj oni trudis alian David-stelon. Unuj ne identas kun aliaj, tio estas pura mensogo.

LabourStart (http://www.labourstart.org/eo/)

## Tutmondaj sindikataj novaĵoj

La esperanta ttt-paĝo de la sindikata ttt-paĝaro prizorgata de Eric Lee daŭre funkcias. Ĝi ĉiam bezonas pli da ret-ligataj helpantoj, kiuj kapablas resumi esperante anglalingvajn artikolojn.

Se vi opinias, ke vi povos helpi, aŭ konas iun, kiu eble povos, bonvolu kontakti: Paul Hewitt <paul@esperanto.freeserve.co.uk>

Intertempe, ni tre dankas al Paul Hewitt, David Curtis, Alwyn Kind kaj la Grimsby Esperanto-Grupo pro iliaj ĝisnunaj laboroj

**Temoj** (plej aktuala parto de longa listo)

Britio Bankestroj, ne elstaru! 16-Apr-2009
Britio Britio ne cedas pri labortempo 16-Apr-2009
Irlando Laboristoj okupas fabrikejon 16-Apr-2009
Germanio Airbus konfesas pri spionado 16-Apr-2009
Mondo Kontraŭ rasismo 03-Apr-2009
Francio Maldungitaj laboristoj forkaptas estrojn 03-Apr-2009
Rusio Sindikatoj petas salajrpliigon 03-Apr-2009
Israelo Senlaboreco kreskas 27-Mar-2009
Francio Unu taga striko 27-Mar-2009
Usono Kreskanta senlaboreco 27-Mar-2009
Mondo Sindikatoj petas registarojn 20-Mar-2009
Kolombio Peto pri respekto 20-Mar-2009
Nederlando Sindikatoj kreskas 20-Mar-2009
Mondo Genra truo je salajroj 12-Mar-2009
Tajlando Terure malriĉaj virinoj 12-Mar-2009
Japanio Laboristoj deziras salajrpliigon 12-Mar-2009
Ukrajnio Laboristoj ekkaptas fabrikejon 08-Mar-2009
Usono La fino de Usonaj labordoloro 08-Mar-2009
Germanio Nazioj marŝas 08-Mar-2009
Ĉinio Oficperdo 03-Mar-2009
Irlando Protesto pri la ekonomio 03-Mar-2009
Azio Migrantaj laboristoj bezonas protekton 03-Mar-2009

### Du raportoj el la granda paĝaro:-

Germanio: - Airbus konfesas pri spionado

De 2005 ĝis 2007 la kompanio Airbus spionis je dungitoj, kontrolante bankokontojn serĉante ligojn kun Airbus-provizantoj. Neniom da malbona farado troviĝis. Airbus promesas ne fari tion estontece.

Ĉi-semajne, Hartmut Mehdorn, estro de la ferovoja kompanio Deutsche Bahn, eksiĝis, kiam esploro montris, ke dum multaj jaroj la kompanio spionis je e-mesaĝoj de dungitoj por malkovri kritikon pri la kompanio.



## ***The Contemporary Financial Crisis*** *(Continued from p 5)*

Yet socialists, since Karl Marx wrote his 'critique of political economy' well over 100 years ago, have known that capitalism expands globally and that the capitalist system is man-made and not a product of nature or the workings of the stars. That the booms and slumps are due to crises of overproduction and the competition, which drives the financial system to crisis. History has demonstrated the resilience of Marx's analysis. The insecurity, unemployment, homelessness, poverty, etc, of millions has returned to Europe and North America. (There would have been no 'sub-prime market' if the poor had been given real jobs in the first place - requiring a fairer distribution of wealth.) And the myopia of capitalist ideology is not new either.

The Belgian socialist Ernest Mandel had already written 'Late Capitalism' (1975) and predicted 'The World Monetary Crisis' (International Journal, Nov/Dec: 1982). He argued that society is organised to serve the interests of corporate capitalism and the banking system. And due to overproduction business and government encourage the over-extension of credit. The socialist challenge is to reorganise the economy and the banks to serve the people. It is no longer tenable to accept Europe just as a market place for the circulation of commodities and the treatment of people as things to be used and discarded. That the rich need big salaries and bonuses to be motivated to work, yet workers should compete for less to get a wage or salary, or be condemned to the dole queue.

Capitalism has failed. It cannot deliver stability, security, and social justice. We need a 'Social Europe', not just a market place. The solution lies in social solidarity, the intellectual strength and moral vision of socialism, which alone can offer a society based on democracy, peace, and social justice.

Guy N.

*.Note that the above is not a word-for word translation of the article opposite.*

~~~~~

## ***What Zamenhof said about workers***

*“Probably for nobody in the world has our democratic language more importance than for workers and I hope that sooner or later they will become the strongest support of our cause. Not only do the workers understand the utility of Esperanto, but they more than others feel the essence and ideas of Esperantism.”*
~~~~~

## Sennaciismo = Homaranismo ??

I have been giving some thought to 'the ideology of Esperanto' for a talk I am working on. Very interesting …

It's well known that Lejzer Zamenhof had a very clear ideology of Esperanto: it was called la interna ideo . In fact, that's only code for the real thing - homaranismo. To begin with, this -ism was called 'hilelism' (after a Jewish rabbi) and was intended for Jews: a sort of 'religious bridge' between judaism and other people. Later, Zamenhof realised that these ideas applied equally to everyone; he changed the name to homaranismo. He wanted to make his ideas public at Esperanto congresses, from 1905 onwards, but the French Esperanto 'establishment' consistently opposed him: a gang of army officers, professors, lawyers, doctors - bourgeois one and all. Zamenhof, a kindly, timid soul, accepted their advice and diluted his ideas into la interna ideo, best expressed in the anthem, La Espero. Finally, he did publish his ideas in a booklet, in 1913.

For Zamenhof, the main divisions between people were ethnic: Jews, Russians, Poles, Germans, etc. This reflects his own experience as a member of the Jewish minority - a persecuted minority, what's more - in a multi-ethnic Russian state. He was less aware of class-divisions, although in his later years he did become aware of and condemned them, alongwith ethnic, language and religious divisions. Fundamentally, Zamenhof believed in the unity of mankind, emphasising brotherhood, justice, humanity. From 1911 onwards, he also condemned nationalism, including Jewish nationalism.

Lanti wasn't a Jew; his background, however, was utterly proletarian. From an early age, he was aware of class-divisions, the cruel gap between those who have and those who don't. So he devised an ideology, not ethnically based, but class-based. In the early days, he rejected homaranismo as sentimentality, but latterly he came to realise that in fact he and Zamenhof shared many ideas about the unity of mankind. Lanti avoided labels like 'socialist' and 'communist', preferring more inclusive ones like 'anti-capitalist' and 'revolutionary'; that's why SAT is called sennacieca, not 'something-ist'. Lanti aimed simply to overturn the bourgeois structure of economic, racial and linguistic privilege, of privileged churches, schools and employment.



## Ĉu sennaciismo = homaranismo ? (Daŭrigo de p1)

Lanti ne estis hebreo; lia familia medio, kontraste, estis tute proleta. Ek de la junaĝo, li plej konsciis pri klasdividoj, la kruelaj dividoj inter posedantoj kaj nehavantoj. Li do elpensis ideologion bazitan ne je gento, sed je klaso. Komence, li forĵetis homaranismon kiel sentimentalaĵon, sed en siaj lastaj jaroj li ekkonsciis, ke fakte li kaj Zamenhof dividis multajn bazajn ideojn pri la unueco de la homaro. Lanti evitis etikedojn kiaj 'socialisma', 'komunisma', preferante pli ampleksajn kiaj 'kontraŭ-kapitalisma', 'revoluciema'; tial SAT nomiĝas 'sennacieca', ne 'ajno-isma'. Lanti ambiciis simple renversi la burĝan strukturon de privilegio ekonomia, rasa kaj lingva, de privilegiitaj eklezioj, lernejoj, laborebloj.

Zamenhof insistis ke oni ne povas esti vera esperantano sen akcepti la ideologiajn sekvojn de tiu engaĝo. Lanti, el malsama elirpunkto, insistis ke vera revoluciema kontraŭ-kapitalisto nepre uzu ne-privilegiitan, ne-nacian lingvon, nome Esperanton. Esence, ili same opiniis pri la nepreco kombini tuthomaran lingvon kun tuthomara ideologio, kvankam devenante el malsamaj socioj. Esence, Zamenhof estis sennaciisto, Lanti homarano !

David Kelso

~~~~~

## Sennaciismo = Homaranismo ?? *(Continued from p 8)*

Zamenhof insisted that you can't be a real esperantist without accepting the ideology that goes with it. Lanti, starting from a different place, insisted that a true, revolutionary anti-capitalist, cannot but use a privilege-free, non-national language, namely Esperanto. Essentially, they agreed that one must combine a language for all with an ideology for all, although coming from different backgrounds. Essentially, Zamnehof was a sennaciisto, Lanti a homarano !

David Kelso

*.Note that the above is not a word-for word translation of the Esperanto version.*
~~~~~